
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-18 n-ro 420

# Disdonu superfluajn manĝaĵojn rete




Ĉefo de UN vokas mondon reveni sur vojon de normala disvolvado

Hundoj helpis homojn jam antaŭ 8 000 jaroj

Vizitrekordo ĉe la Esperanto-muzeo en Vieno

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Ĉefo de UN vokas mondon reveni sur vojon de normala disvolvado
*La mondo retroiris en la lasta jaro p. 03*

Institucio de UN promesas pluan servon al palestinaj rifuĝintoj
*Agentejo de UN pri Helpo kaj Konstruo al Palestinaj Rifuĝintoj en Proksim-Oriento p. 03*

Francio: Kalezo: «Ĉiujn vesperojn, la policistoj forprenas niajn tendojn kaj frapas nin», rakontas la migrantoj
*Simbolo de la migrad-krizo p. 04*

Grekio adoptas novajn reformojn
*Postulataj de la kreditoroj de la lando p. 05*

Aviadilo joris dum alteriĝo kaj falis talusen
*En Trabzon – urbo en nordorienta Turklando p. 06*

La interesa bildraporto pri serpento englutanta lacerton en brazila urbo
*Nekutima okazintaĵo p. 06*

Disdonu superfluajn manĝaĵojn rete
*OLIO estas enreta aplikaĵo p. 07*

Hundoj helpis homojn jam antaŭ 8 000 jaroj
*La forta emocia ligo inter homoj kaj hundoj estas universala fenomeno p. 08*

La atendo de miljaroj: Vizito al la antikva kaverno *Alu*
*Antikva kaverno Alu p. 09*

Vizitrekordo ĉe la Esperanto-muzeo en Vieno
*Pli ol 20 000 vizitantoj p. 11*

Hodiaŭe
*Alan Alexander Milne; kaj Papilio p. 12*

# Ĉefo de UN vokas mondon reveni sur vojon de normala disvolvado

Ĝenerala Sekretario de UN António Guterres diris marde [16 jan 2018], ke la mondo retroiris en la lasta jaro, kaj ke ĉiuj landoj devas unuiĝi kaj kuraĝe trakti la defiojn por ke la mondo revenu sur la vojon de normala evoluigo.



Guterres faris la rimarkojn dum parolado pri sia laboro de la jaro 2017 en neoficiala kunveno de la Ĝenerala Asembleo de la UN. Li rimarkigis, ke nun, konfliktoj estas pli profundaj kaj novaj dangeroj evidentiĝas; la maltrankvilo de la tuta mondo pri nukleaj armiloj estas sur la plej alta nivelo de post la malvarma milito; klimatŝanĝiĝo estas pli intensa; maljusteco grandiĝas; la homaj rajtoj estas serioze atencitaj; naciismo, rasismo kaj ksenofobio leviĝas. Li diris, ke la situacio montris, ke ĉiuj landoj devas unuiĝi kaj kuraĝe trakti defiojn por ke la mondo revenu sur la vojon de normala evoluigo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Institucio de UN promesas pluan servon al palestinaj rifuĝintoj

Agentejo de UN pri Helpo kaj Konstruo al Palestinaj Rifuĝintoj en Proksim-Oriento marde [16 jan 2018] publikigis komunikaĵon, dirantan, ke ĝi alfrontas la minacon de Usono per frostigo de monhelpo, tamen ĝi servos plu al palestinaj rifuĝintoj.



Proparolanto de Agentejo de la UN pri Helpo kaj Konstruo al Palestinaj Rifuĝintoj en Proksim-Oriento, Sami Mshasha, diris en la komunikaĵo, ke la agentejo, kvankam afrontanta reduktajn rimedojn, liveros plu gravajn servojn al palestinaj rifuĝintoj, kaj tiu ĉi promeso ne povas esti influita de la usona minaco pri tranĉo de monhelpo al ĝi.

La proparolanto diris, ke la agentejo daŭre liveras al 5,9 milionoj da rifuĝintoj en Cisjordanio, Gazao, Sirio, Libano kaj Jordanio servojn de socio, helpo, medicino kaj eduko. Li akcentis, ke ili ne forlasos palestinajn rifuĝintojn, sed klopodos por protekti la dignon kaj rajtojn de la rifuĝintoj kaj serĉi novan fonton de fonduso.

La 6-an de decembro Usona Prezidento Donald Trump anoncis agnoski Jerusalemon kiel la ĉefurbon de Israelo kaj ordonis komenci la procezon de translokiĝo de la Usona ambasadorejo. Palestino esprimis fortan malkontenton kaj bojkotis la usonan decidon per rifuzo de intertraktado kun Israelo. Poste Trump minacis Palestinon per tranĉo de monhelpo al la agentejo.

Yu
Ĉina Radio Internacia



# Francio: Kalezo: «Ĉiujn vesperojn, la policistoj forprenas niajn tendojn kaj frapas nin», rakontas la migrantoj

Mardon la 16-an de januaro 2016, Emmanuel MACRON vizitis Kalezon, simbolon de la migrad-krizo, por defendi sian politikon pri azilo kaj migrado. De post la malmuntado de la «ĝangalo» en oktobro 2016, la asocioj kritikas la maldignajn vivkondiĉojn de la migrantoj.
Husajn kaj Barak dormas en arbaro. Ambaŭ etiopiaj junuloj nomas ĝin «ĝangalo», same kiel tiu koncentrejo evakuita en oktobro 2016. Ili montras tri tendojn metitajn sur la kotan kaj glacian grundon. Ĉirkaŭe estas forĵetaĵoj, kartonoj kaj vitroboteloj. «Malvarmegas, - ili rakontas. - Ĉiujn vesperojn, la policistoj forprenas niajn tendojn, niajn dormosakojn kaj frapas nin. La vivo en Kalezo estas malfacilega, nehumana».

Tiuj diroj kolerigas Gilles DEBOVE, delegiton de la sindikato *Unité SGP Police Force Ouvrière*. «Mi tute ne kredas tion», li reagas. Laŭ li, la policistoj malmuntas nur la novajn kampadejojn. Li deziras, ke la policistoj estu ekipitaj per kameraoj por pravigi siajn dirojn. «Post la malmunto, kiam la personoj jam forlasis la lokojn, tie restadas efektive tendoj, dormosakoj, forlasitaj ŝuoj, kaj la stratservoj kolektas la aĵojn, kiuj ja estas poste detruitaj», eksplikas Gilles DEBOVE.

**Plendoj deponitaj pro detruado de posedaĵoj**

Tiuj posedaĵoj de la migrantoj estas alpruntitaj de la asocioj. Pro tio, la *Auberge des migrants*, (Gastejo de la migrantoj), en kiu Maya KONFORTI estas volontulino, lasis plendon pri detruado de ŝiaj posedaĵoj. «Ni kunsubskribis prunto-kontrakton. Ni markis la dormosakojn kaj la kovrilojn per la nomo de nia asocio», ŝi eksplikas.

Ni diris al ili: «Kiam la polico forprenas vian dormosakon, alvoku nin kaj deklaru, ke la polico forprenis de vi posedaĵojn, kiuj apartenas al la asocio».

Du asocioj tiel plendis pro «detruado de posedaĵoj». Aliaj asocioj pretas efektivigi saman demarŝon. Du asocioj rifuzis renkontiĝi kun Emmanuel MACRON dum lia vizito.

Neniam Milito Inter Ni




# Grekio adoptas novajn reformojn

Pasintan lundon, la grekaj deputitoj adoptis novan aron da reformoj, postulataj de la kreditoroj de la lando, inter kiuj interalie restrikton de la strikrajto, spite strikojn kaj manifestaciojn dum la tuta tago.

Tiuj manifestacioj kaj strikoj tute ne efikis. La greka Parlamento adoptis la novajn reformojn postulatajn de la kreditoroj cele al «perfuzo» de la lando. 154 deputitoj poris, 141 kontraŭis, 5 malĉeestis, dum pli ol 6 000 personoj manifestaciis en la ĉefurbo en pluraj manifestacioj kontraŭ la reformo, indikis la polico.

Inter la 400 artikoloj adoptitaj, la plej kritikata decido koncernas restrikton de la strikrajto kaj truditajn aŭkciojn de bienoj, kiuj apartenas al nesolventaj debitoroj.

Antaŭ la deputitoj, la ĉefministro Aleksis Tsipras [Αλέξης Τσίπρας], elektita en 2015 kun la programo de la radikala maldekstro de lia partio *Syriza*, firme forpuŝis la kritikojn devenantajn interalie de la sindikatoj, laŭ kiuj la registaro pretas limigi la strikojn.

«Post la interkonsento fintraktita ene de la Eŭrogrupo, nia celo estas difini planon por malpezigi la grekan ŝuldon» substrekis la ĉefministro.

Kvankam la ĉefministro kontentiĝas pri la baloto, laŭ la centra-dekstra opozicio, tio estas malbona decido por la lando: «La vero estas, ke vi kompromitis la estontecon de la lando por daŭro de almenaŭ kvin jaroj. Malaltigi la pensiojn kaj altigi la impostojn malhelpas kreskadon de reala ekonomio», diris Kyriakos Mitsotakis, prezidanto de *Nova Demokratio*, ĉefa opozicia partio.

Post la baloto lunde, Ateno esperas, ke la eŭropaj ministroj pri financoj aprobos la 22-an de januaro la helpo-pagon de almenaŭ 4,5 miliardoj da eŭroj. «La hodiaŭa baloto estos decidiga por akceli la eliron de la lando el la savplano post sep monatoj», deklaris Tsipras.

Neniam Milito Inter Ni

# Aviadilo joris dum alteriĝo kaj falis talusen

Sabatvespere la 13-an de januaro en *Trabzon* – urbo en nordorienta Turklando, sur la sudorienta marbordo de la Nigra maro – aviadilo joris dum alteriĝo sur la aviadilodromo de la loka flughaveno, kaj falis en taluson ĉe la marlimo.



La virino Fatma GORDU (pasaĝero) diris al la registara novaĵagentejo *Anadolu*, ke la subita neregado de la aviadilo panikigis ĉiujn: "Unue ni kliniĝis flanken, kaj post antaŭen, ondo da paniko estiĝis kun multe da krioj".

Tiu aviadilo *Boeing 737* de la firmao *Pegasus Airlines* tiam estis transportanta 168 homojn ekde la turka urbo Ankaro, kaj ĉiuj estis sekure retiritaj, kiel informis la estro de la provinco, Yucel YAVUZ, kaj la kaŭzoj de la akcidento estas enketataj de la aŭtoritatoj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---

# La interesa bildraporto pri serpento englutanta lacerton en brazila urbo

Nekutima okazintaĵo en urboj estis spektita sur avenuo de la brazila urbo Baŭruo, en la subŝtato San-Paŭlo: la manĝego de iu verda lacerto fare de iu falsa koralserpento.




La tuta afero estis kaptitaj de la fotilo de Júnior ESTEVES – kiu estas faka fotisto pri naturmedio – ekde tiam kiam la serpento senmovigis la lacerton, kiu estis tute englitita je tempodaŭro da ĉirkaŭ horo kaj duono.

ESTEVES faris tiujn fotojn je la 29-a de decembro 2017 ĉe la avenuo Jorge ZAIDEN, en regiono proksime de la *"sambódromo"* (sambejo) de la urbo.

Jen la fotoj (vidu).

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog




# Disdonu superfluajn manĝaĵojn rete

OLIO estas enreta aplikaĵo, kreita por malpligrandigi perdon de manĝaĵoj per socia retumado. Post registriĝo en OLIO uzantoj povos alŝuti fotojn kaj priskribojn de manĝaĵoj kiel superfluaj legomoj, konservaĵoj aŭ ceteraj nebezonataj manĝaĵoj, kiujn ili volas disdoni. Post sia lanĉo en Unuiĝinta Reĝlando komence de la jaro 2016, OLIO ekhavis 322 000 uzantojn kaj 400 000 proponojn pri disdonataj manĝaĵoj. Triono de la uzantoj devenas el malriĉaj familioj.

"La manĝdisdona sistemo certe ankoraŭ bezonas plibonigojn" - diras kunfondintino de OLIO Tessa Kuk, kiu inspiriĝis pri kreo de la aplikaĵo ŝiavorte por okupiĝi pri "unu el la plej grandaj problemoj, kiujn alfrontas la homaro hodiaŭ", laŭ informo de *Independent*. Triono de la tuta produktita manĝaĵo en la mondo estas forĵetata, kio egalas al 700 pundoj de monperdo por ĉiu familio en Unuiĝinta Reĝlando. Kuk estis inspirita post unu kazo, kiam ŝi vidis, ke homoj volis disdoni superfluan manĝaĵon, sed ne povis trovi bezonantojn. "Mi ekpensis, ke tio estis perfekta kaj bona manĝaĵo kaj tutcerte devas esti iu ne pli fore ol je 100 metroj, kiu ŝatus ĝin. La problemo estas, ke ili ne scias pri tio" - diris ŝi.

Kiam Kuk komprenis, ke ne ekzistas tia ĉi manĝdisdona aplikaĵo, ŝi kune kun Saaŝa Celestial-One, iama usona investa bankisto, kunfondis OLIO-n post kolekti 2,2 milionojn da dolaroj de investoj. OLIO nun kunlaboras kun kafejoj kaj vendejegoj por malpligrandigi forĵetadon de manĝaĵoj survoje pozitive influante komercadon kaj konduton de klientoj. Disdonaj aplikaĵoj kiel OLIO substrekis pozitivajn kapablojn de socia enretiĝo. "Tio ĉi videbligis eblon en la kutima medio ĉirkaŭ ni kaj tio povas esti ege efika afero" - diras Ĝo Iles, la ĉefa redaktoro de la eldono *Circulate*, kiu subtenas ideon de cikla ekonomiko, kio signifas reuzadon de materialoj kaj produktoj.

Kirill Noviĉenko
Interalie

# Hundoj helpis homojn jam antaŭ 8 000 jaroj

La forta emocia ligo inter homoj kaj hundoj estas universala fenomeno. Lastatempaj arkeologiaj eltrovoj montris, ke fakte ĝi estas tre antikva. Oni trovis en Saud-Arabio ŝtonajn pradesegnaĵojn faritajn antaŭ pli ol ok mil jaroj, kiuj montras, ke homoj tiam jam ĉasis kune kun hundoj. Ili estas la plej antikvaj gravuraĵoj montrantaj tian kunvivadon, ĝis nun trovitaj. Entute oni nombris 350 gravuraĵojn, inter kiuj oni eĉ povas vidi hundojn regatajn per rimenoj. Laŭ ilia aspekto, ŝajne ili estis hundoj de la raso *"Kanaana"*, kiu ekzistas ĝis nun. Tiu kunlaborado estis esence grava por la homa pluvivado.



Esploroj pri la deveno de hundoj nuntempe montras, ke la genetika disdiferenciĝo disde lupoj okazis antaŭ 33 000 jaroj, en Azio. Novaĵo estas la inklino de sciencistoj opinii, ke ne la homoj enhejmigis hundojn, sed ke hundoj alproksimiĝis proprainiciate al homaj grupoj por serĉi manĝaĵon. Kunvivado inter ili estas do tre antikva fenomeno.

Studoj montris, ke hundoj kunvivis kun homoj longan tempon antaŭ ol aliaj bestoj, kiel bovoj kaj kaproj. Tio okazis jam antaŭ la neolitiko, kiam verŝajne elvolviĝis agrokulturo kaj dresado de bestoj.

Tamen, la momento, kiam aperis la unuaj hundoj en la mondo, kiel derivaĵo de lupoj, estas ankoraŭ duba. Depende de la esploristoj, ĝi varias de antaŭ 10 000 ĝis 38 000 jaroj. Sed la ŝtongravuraĵoj trovitaj en Saud-Arabio malfermas novan perspektivon, ĉar ili klare montras hundojn regatajn de homoj per rimenoj. Tio certe multe faciligis la ĉasadon. En tempo, kiam nutraĵoj estis malabundaj kaj ne troveblaj dum la tuta jaro, tio forte favoris ambaŭ speciojn. Unuafoje oni trovis "dokumentojn", kiuj registris, de kiom longa tempo ili estis proksimaj, reciproke.

Hundoj fariĝis tiel intimaj al homoj, ke ili inspiris filozofian skolon. Antisteno, disĉiplo de Sokrato, fondis Cinikismon, laŭ kiu ideala homa vivo devus esti simila al tiu de hundo (*Kynos*, en la greka lingvo): simpla kaj spitanta riĉecon kaj plezurojn. La plej fama ano de tiu skolo estis Diogeno el Sinopo, kiu loĝis en barelo. Kiam Aleksandro la Granda demandis lin, kial li sin nomas hundo, li respondis: "Ĉar mi flatas tiujn, kiuj donas al mi ion, mi bojas kontraŭ tiuj, kiuj rifuzas al mi, kaj mordas malbonulojn".

Paŭlo Sergio Viana
Esperanta Retradio

# La atendo de miljaroj: Vizito al la antikva kaverno *Alu*

Por alveni al la antikva kaverno *Alu* en sudorienta *Yunnan*, vojaĝantoj el *Kunming* devas veturi 200 kilometrojn en la direkto de la fama Ŝtona Arbaro, ĉine konata kiel *Shilin*. Pejzaĝa ŝanĝo markas ĝian alproksimiĝon. Pli kaj pli ofte aperas vastaj kampoj da sunpaneloj interrompitaj de izolitaj kalkŝtonaj formoj, kies granda koncentriĝo donas al la arbaro ĝian nomon. Finfine bonvenigas nin la pordego de granda parko, kun vortoj kaj simboloj de la kulturo *Alu*, iu branĉo de la *Yi*-nacio, kies nomo signifas en loka lingvo "akvo kaj ŝtono." Iliaj prapatroj rivalis dum iu tempo kun la potenco de la reĝlando de *Dali*. Onidire ili loĝis en la kaverno ekde antaŭ la naskiĝo de Kristo kaj dum la pli proksimaj jarcentoj igis ĝin grava loko por la kulto de la kompatoplena bodhisatvo Guanyin.



Proksime de la malgranda akvofalo, kiu freŝigas la enirejon de la kaverno, staras la statuo de Xu Xiake (徐霞客), fama ĉina geografisto kaj vojaĝinto de la *Ming*-dinastio. Li esploradis la kavernon en 1638, kiam li estis kvindekdu-jaraĝa. En sia *Taglibro de Vojaĝo* li priskribis la aron de profundaj kavernoj, disvolvitaj fare de akva korodo inter la rok-tavoloj kaj traboritaj en zigzagantaj stalaktitoj. Tiatempe, kiel li skribis, neniu kuraĝis eniri en la kavernon sen kunporti torĉon kiel gvidilon tra ĝiaj krutaj kaj labirintaj vojetoj. Nuntempe la spektaklo similas pli al la sperto de la princo Ahmed en la *Mil kaj unu noktoj*, kiu eniris en la kavernon de la feino *Pari Banu*. Li timis sin perdi en tenebroj, sed devis miregi vidalvide al lumo tute malsama de tiu, kiun li ĵus lasis.

Tamen princo Ahmed malkovris en la eno de sia monto mirindan palacon kaj majestan virinon. Male, la nuntempaj vizitantoj de la 1,6 kvadrataj kilometroj de la antikva kaverno *Alu* trovas miriadon da koloroj, donitaj de la interago inter kalkŝtonoj, akvo-reflektoj kaj granda uzado de bunta elektra lumo. Se oni volas plene kapti en fotoj tiun buntecon, endas forpreni fulmobrilon. Se oni ĝin uzas, fakte, ĉio tuj ŝanĝiĝas. Kalkŝtonoj revenas al siaj originaj variacioj de brun-koloro kaj al sia minerala kondiĉo pli rapide ol la nanoj en la filmo *La nibelungoj* (germane, *Die nibelungen*: Siegfried, 1924) de la aŭstra reĝisoro Fritz Lang. Kiel eble filmamantoj memoras, ili fakte ŝtoniĝas kiam la heroo Sigfrido glav-mortigas ilian reĝon Alberiko-n en la kaverno de la trezoroj. Por la ĝojo de pli scienc-orientitaj kaj geologiemaj vizitantoj nova pejzaĝo tiel aperas ankaŭ en la antikva kaverno *Alu*.

La strukturo de la plej mirinda kavernaro de *Yunnan* inkluzivas la *Luyuan* kavernon, la

imponajn salonojn de la Jad-kolona kaverno, la subteran Jad-stalagmitan riveron kaj la pli brile blankan Verd-jadan kavernon. La Jad-kolona kaverno prenas sian nomon de ok-metrojn alta stalagmito nomata "Jad-kolono subtenanta la ĉielon". De tie, per humide glitiga ŝtuparo, oni malsupreniras al la Jad-stalagmita rivero, kies transpaso per boato okazas tra intense blua lumo. Je la fino de la Verd-jada kaverno oni troviĝas sur malalta monteto, el kiu oni malsupreniras. En ĉiuj tiuj kavernoj stalagmitoj kaj stalaktitoj rigardas unu la alian, atendante kison dum miljaroj. La ĉina amo por la neatenditaj korespondoj kaj metamorfozoj inter naturaj regnoj trovas ĉi tie fekundan grundon por la kreiva forto de sia imag-kapablo. Ĝi vidas en iliaj formoj interalie akvofalon de ludantaj drakoj, antikvan testudon rigardantan la lunon, forkurantajn budhismajn disĉiplojn kaj, plej grave por ni esperantistoj, krokodilon meze de la aero.



Ankaŭ la organizado de la vojiro tra la grandaj subteraj salonoj estas subtile planita laŭ la ĉina pensmaniero pri pejzaĝa prezentado kaj fotado. Ni povas trovi interesan priskribon de ĝiaj bazaj karakteroj en intervjuo, kiun la fama nederlanda dokumenta filmisto Joris Ivens kaj lia franca edzino Marceline Loridain donis al la *Francaj Kinkajeroj* (france, *Cahiers du cinéma*) en majo de 1976 pri la farado de sia filmaro pri Ĉinio, *Kiel Yukong formovis la montaron* (france, *Comment Yukong déplaça les montagnes*). Tiam multe da okcidentanoj interesiĝis pri la ĉina Kultura Revolucio, kiel pruvas ekzemple la filmo *La ĉinino* (france, *La chinoise*,1967) de la svisa reĝisoro Jean-Luc Godard, kies junaj revoluciemaj protagonistoj avide aŭskultas la elsendojn de Radio Pekino. Sed kio distingis la dokumentan filmon de Ivens kaj Loridain de la aliaj samtempaj okcidentaj filmoj estis ilia ŝanco pli funde kompreni la ĉinan kulturon pere de plur-monata komunikado, kunlaborado kaj amikec-konstruado kun ĉinaj laboristoj kaj filmistoj en Ĉinio.

Kiel Ivens kaj Loridain diras, enkadrigi vizaĝojn proksime estis ĝis tiam tre rare en ĉinaj filmoj, inkluzive en dokumentaj filmoj. Tio dependis de la fakto, ke en la vida kulturo de Ĉinio la homo ne estas la centro de la universo, kiel en Eŭropo. Male en Ĉinio, oni konsideras la homon kiel tute malgranda parto de la universo. Arto estas la homo kaj la universo. Pro tio, en la ĉina klasika pentrado, la homo estas tre malgranda kaj, krom en budhismo, ne ekzistis portreta kulturo. Laŭ Ivens kaj Loridain, la proksima enkadrigo de vizaĝo por ĉinoj estis preskaŭ ne-deca, tro multe ligata al privata vivo aŭ al la publika montro de sentoj, kiujn pudore oni devus kaŝi. En la grandaj subteraj salonoj de la antikva kaverno *Alu*, homoj estas simile malgrandaj, dum stalagmitoj kaj stalaktitoj atendas dum miljaroj kisi unu la alian.

Alessandra Madella
Ĉina Radio Internacia

# Vizitrekordo ĉe la Esperanto-muzeo en Vieno

La Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko pasintjare havis pli ol 20 000 vizitantojn. Tio estas rekordo por la muzeo, kiu estis fondita antaŭ 90 jaroj, rakontas la estro de la muzeo, Bernhard TUIDER.



La Esperanto-muzeo situas en la centro de Vieno, unu el la plej grandaj urboj en Eŭropo. Tial ĝi estas rimarkata de multaj personoj kaj ankaŭ estas tre grava pordo al la publiko. Dum la pasintaj jaroj la nombro de vizitantoj daŭre kreskis.

En 2017 rekorda nombro da 21 256 personoj vizitis la Esperanto-muzeon, kompare kun la jaro 2016 (15 937) tio estas rimarkinda plialtiĝo de 33 %, kompare kun la jaro 2006 (5 025) eĉ 323 %.

Inter la vizitantoj estas ne nur personoj el Vieno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, precipe gelernantoj kaj gestudentoj, sed ankaŭ multaj turistoj. Same daŭre venas esperantistoj el diversaj partoj de la mondo en la Esperanto-muzeon, kiu – fondita en 1927 – konservas kaj disponigas mondskale la plej ampleksan kolekton pri Esperanto kaj planlingvoj.

Tiu ege pozitiva evoluo baziĝas precipe sur la pliampleksigo de la deĵorhoroj, la enkonduko de novaj laŭaĝaj atelieroj kaj sur eventoj kun specialaj laŭtemaj gvidadoj.

Ĉiujare la Esperanto-muzeo – kaj la kvar aliaj muzeoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko – partoprenas plurajn naci- kaj internacikadrajn kulturajn aranĝojn.

Dum la "Longa Nokto de la Muzeoj" kaj la "Tago de la Malfermita Pordo" ni proponas specialajn gvidadojn kaj Esperanto-fulmkursojn. Dum la "Tago de la Monumentoj" kadre de la Eŭropaj Tagoj de kultura heredaĵo ni precipe parolas pri Esperanto kadre de varia speciala temo: 2014 *Illusion* ("Iluzio"), 2015 *Feuer und Flamme* ("Fajro kaj flamo"), 2016 *Gemeinsam unterwegs* ("Kune survoje"), 2017 *Heimat großer Töchter* ("Patrujo de elstaraj filinoj"), 2018 *Schätze teilen* ("Dividi trezorojn").

Ekzemple en 2017 ni pli koncentris nin pri la elstaraj filinoj ol pri la patrujoj kaj informis pri "Lidja ZAMENHOF kiel eminenta filino" memorigante pri la 75-a datreveno de ŝia morto.

Por lernejaj klasoj la Aŭstria Nacia Biblioteko ofertas aĝospecifajn programojn, la tiel nomatajn *"Wissenswelten"* (sciomondoj), pro kiuj dum la pasintaj jaroj pli kaj pli da infanoj kaj gejunuloj ĝuis gvidadojn kaj Esperanto-fulmkursojn.

Ankaŭ grupoj de plenkreskuloj – precipe universitatanoj – volonte kaj regule mendas Esperanto-kurson aldone al la gvidado.

Tiel ĉiujare inter 40 kaj 50 grupoj ricevas dum 30, 60 aŭ 90 minutoj bazajn konojn pri

Esperanto, ili povas efektoplene sperti, ke la lingvo bone funkcias, kaj ili ankaŭ ekscias, ke ĝi estas ĉiutage uzata en nia instituto – de dungitoj kaj de vizitantaj esperantistoj.

Krome vizitantoj povas percepti, ke la Esperanto-muzeo estas ne nur muzeo, sed – ekde sia fondo en 1927 – ankaŭ biblioteko kaj arkivo, kiu nuntempe konservas kaj disponigas jenan havaĵon:


- 40 000 faldfolioj
- 35 000 volumoj
- 25 000 gazeteltondaĵoj, precipe el la tempo 1900–1920
- 22 000 fotoj kaj fotonegativoj
- 10 000 manuskriptoj kaj aŭtografoj
- 3 700 diversaj periodaĵoj
- 3 000 muzeaj objektoj
- 1 500 afiŝoj
- 850 aŭd-vidaj materialoj
- 56 antaŭlasaĵoj, postlasaĵoj kaj arkivoj (de asocioj, eldonejoj kaj revuoj)

Se oni konsideras, ke la Esperanto-muzeo disponas pri ekspozicia spaco de nur 80 kvadratmetroj, la statistiko estas elstara: ekde 2005, kiam la nova ekspozicio en *Herrengasse 9* estis inaŭgurita, vizitis ĝin pli ol 130 000 personoj, okazis preskaŭ 700 gvidadoj kaj pli ol 350 Esperanto-fulmkursoj (regule nur ekde la jaro 2009), kiujn partoprenis entute pli ol 8 000 personoj.

Pli da informoj troveblas en la retejo de la Kolekto por planlingvoj (vidu) kaj en la retejo de la Esperanto-muzeo (vidu).

Bernhard Tuider
Libera Folio

---



## Alan Alexander Milne

**La brita verkisto A(lan) A(lexander) Milne [ej ej miln] (naskiĝis la 18-an de januaro 1882; mortis la 31-an de januaro 1956) famiĝis ĉefe pro siaj infanlibroj.**

**En Esperanto aperis:** ***Winnie-La-Pu*****.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

***Polyommatus bellargus*****, Britio.**

**Vikipedio**